


# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 537

JULIO-AUGUSTO 1950

## HOMOJ KONTRAŬ LA DEZERTO



[Foto: C. M. Houghton]

**Irigacia Rado ĉe Eŭfrato**



# ANONCETOJ

Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

**Serĉataj :** Historio de la lingvo universala (Couturat, Drezon), Mitridates (Adelung — lingvara traktato), Discussiones (Peano), kaj Progreso (Couturat, 1908-11). D-ro Zeballos Morales, Fray Marcos, Urugvajo.

**Antonio Pastor,** Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

**Kuracisto sesdekjara** deziras korespondi pri rimedo fariĝi centjaraĝa. D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

**Fremdultrafika Servo en Belgujo,** Konijnpenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo, sendas Esperantajn turistajn prospektojn, prizorgas malmultekostajn Esperantistajn hotelojn.

**S-ro Carlos Martinez,** Estación Plaza de Armas, Pabellón V.O., Sevilla, Hispanujo, interŝanĝas ĉiajn poŝtkartojn; preferas bildojn de preĝejoj aŭ stacidomoj.

**Brazilajn poŝtmarkojn kaj poŝtstampojn** kun Esp.-teksto mi sendos kontraŭ poŝtmarkoj memorigaj pri la Sanktaj Jaroj kaj 75-a datreveno de Universala Poŝtunio (novaj aŭ uzitaj, po du aŭ tri ekzempleroj). Oswaldo Leite de Moraes, Rua Libero Badaró 39-6, São Paulo, Brazilo.

**Konkurso.** Diru vian opinion pri poezio. Kondiĉoj : 1. Ne pli ol ses vortoj : ne kalkulataj, artikolo, konjunkcioj, prepozicioj. 2. Skribu Interstene laŭ la unua parto de la Gvidilo. 3. Aldonu (longaskribe) la nacilingvan tradukon kaj adreson bele skribitajn. 4. Ĉiu naŭdeko da konkurantoj ricevos unu premion, duŝilingan krediton por aĉeto de libro ĉe UEA. 5. Tempolimo 31-1-1951. 6. Uzu poŝtkarton kun pagita respondo (aŭ letere aldonu respondkuponon). La delegito de UEA en Tortona, Italujo.

**Félix Martin,** str. Predicadores 76, Zaragoza, Hispanujo, deziras korespondi. Interŝanĝas pm., pk. il., kun la tuta mondo.

**S-ano R. Santiañez Alberich,** C. S. Luis 61, 3, I, Barcelona (G), Hispanujo, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

**S-ro Jussi Sive,** instruisto, SARA, Finnlando, respondas al komencantoj, korektas erarojn kaj resendas leterojn kontraŭ rekompenco per 3-8 ekz. da ĝuste stampitaj internaciaj respondkuponoj aŭ 50-125 ekz. da uzitaj sendifektaj poŝtmarkoj. Malnova Esperantisto. Afranku per jubileaj, bonfaraj aŭ ruĝkrucaj poŝtmarkoj !

**Svisa jurnalistino,** dezirante pli bone konigi Skandinavion al svisa publiko, estus tre danka al skandinavaj gesamideanoj pro ĉiuj informoj, ankaŭ en skandinavaj, angla, franca aŭ germana lingvoj, pri skandinavaj kutimoj, arta vivo, turismo, k.t.p. Lambert de la Lauze, Case Eaux-Vives, Genève, Svislando.

**Kontraŭ sendado de malgrandaj tipaj objektoj,** pentraĵoj, manfaritaj aĵoj, el via lando mi sendas kompletajn seriojn da rememoraj kaj aeraj neuzitaj pm. el Argentino. Skribu nunne : interŝanĝo de pm. ne interesas min. Luis Vicino, Maza 1450 23/7, Buenos Aires, Argentino.

**Cele allogi gesimpatiantojn,** Esperantistoj deziras korespondi tutmonde, ĉe Francujo. Deillac, Monbahus (Lot-et-Garonne), Francujo.

**Deziras korespondi** kaj ĉiam respondos Bohuslav Novotny, Hlušovice 48, u Olomouce pp. Bohunovice, Ĉeĥoslovakujo.

**Ekvadoro.** Se iu konas Esperantiston en Ekvadoro ni petas ke li sendu ties nomon kaj adreson al UEA, ĉar tie estas nova Esp. kiu tute ne havas kontakton kun iu.

**Deziras korespondi pri kudrado** Iver Svarstad, P.O. Box 181, Los Angeles, California, Usono.

**Ĉeĥoslovakino,** 30-jara, deziras interŝanĝi vidajkartojn kun la tuta mondo. Fulvia Tihláríková, Legionárská 15/3.p., Brno, Ĉeĥoslovakujo.

**Felipe Acquavite,** Rua Abilio Soares 1227 c/11, São Paulo, Brazilo, volas korespondi kun geesperantistoj pri ia temo.

**S.O.S.** Nova grupo aranĝas ekspozicion por batali movadon kontraŭ Esperanta instruado en lernejo. Sendu leterojn k.t.p. al DEK, Technical School, Denton, Manchester, Anglujo.

**Aviso.** Mi petas niajn gekorespondantojn, geamikojn, pro malhelpigo de mia edzo, provizore ĉesigi la korespondadon. S-ino D-ro Vince Toth.

**Por pedagogia celo** kaj prepare al grava lerneja Esperanto-kurso bonvolu sendi, antaŭ la 15a de oktobro, bildkarton al : Reĝa Ateneo, Gentpoortstraat, Deinze, Belgujo. Certa respondo !

**Nekatolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzaand, Nederlando.

## GEEDZIGO

Sinjoro, 44, Pollandano, multaj jaroj en Aŭstralio, Brita-Aŭstralio civitano, komercisto, baldaŭ vizitonta Eŭropon, deziras korespondi kun juna, belaspekta, bonkarakterata judino, celo geedziĝo. Respondos nur al seriozaj leteroj kun fotografajo, korekta aĝo kaj multaj personaj detaloj. Konfidenco garantiata. Skribu aerpoŝte en Esperanta, angla, franca, pola, juda aŭ germana lingvo al :

Mr. N. Herz,

c/o G.P.O., Melbourne, Victoria, Aŭstralio.

**D** ALBRECHT DÜRER : 28 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj de **H**  
**E** Hans Koch **A**  
**N** **V**  
**O** **E**  
**V** **B**  
**E** **L**  
**E** **A**

Mendu ĉe :  
**U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**  
 48. Sp. afrankite

43a JA

Univer

Fonda

MA

Ĉion por

Palais V

Traduko  
 estas per  
 citu la fo  
 celo oni s  
 aperas re  
 a

Ĉion pri  
 kaj de la  
 abonado,

UNIVERSA  
 Heronsg  
 H

Jara abon  
 (kun me

Ĉefdelegite

Tarif

1 paĝo 25  
 1/2 paĝo 25

Anoncetoj

2 pencej  
 1 int. res

Legant



# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Julio-Aŭgusto 1950

N-ro 537 (7-8)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

#### Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.  
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

#### Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkuponon por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## ESPERANTO NUN FORTA KLERIGA MOVADO

Lastjare oni faris kalkulon pri la nombro de personoj, kiuj vizitis kongresojn, somerkursojn aŭ libertempajn aranĝojn speciale por la esperantistoj, kaj oni venis al la konkludo, ke kolektiĝis ne malpli ol 10,000 personoj. Tiu cifero estas vere impona, des pli ĉar la programoj de la renkontiĝoj grandparte enhavis seriozajn aferojn kun prelegoj kaj diskutoj poplarsciencaj, edukaj aŭ organizaj. Movado, kiu povas en unu jaro inter siaj adeptoj kolekti 10,000 personojn okaze de kongresoj kaj kursoj, estas konsiderinda faktoro en la koncepto de la ĝenerala publiko !

Laŭ la raportoj, kiuj venis pri la ĵarkongresoj de la landaj asocioj, la nunjara kolektiĝo estos same multnombra. Kiel ekzemplojn ni povas mencii la ĉeĥoslovakajn kaj la germanajn kongresojn kun 1,000 resp. 500 aliĝintoj.

Baldaŭ komenciĝos ankaŭ deko da internacia somerkursoj, el kiuj la plej multaj jam estas tute plenigitaj. U.E.A. kore salutas ĉiujn esperantistajn eventojn kaj deziras grandan sukceson !

Kiel ĉefa evento de la esperantistoj dum la somero okazos en aŭgusto la universala kongreso de Esperanto en Paris. Aliĝis pli ol 2,000 personoj. La aranĝintoj de tiu kongreso esperas, ke ĝi fariĝos *meĵloŝtono* en la historio de Esperanto. Pli ol iam ĝi volas postuli de ĉiu kongresano laboron kaj aktivan partoprenon en la sekcia laboro. Kaj pli ol iam ĝi turnos sian vizaĝon al la ĝenerala publiko per invitoj al oficialaj francaj internaciaj instancoj kaj per aranĝo de speciala gazetara servo, kiu liveros materialon al la ĵurnalistoj. Ĉio indikas, ke tiu kongreso estos grandioza kaj sukcesa.

Ĝis la revido en Paris !

*E. Malmgren,*  
Prez. de U.E.A.



Georges Avril:

## HA! PARIZO!

La kroniko raportas, ke iam, de Anglo ĵus reveninta el Parizo, oni demandis, kion li opinias pri la franca ĉefurbo. "Ha," li diris, revemkarese, "Parizo! Ĉarma eta urbego!" kaj sinkante en siajn rememorojn, li silentis . . . .

Kvankam tio ĉi okazis en la dekoka jarcento, tamen la sopira respondo de tiu delikate sentema Anglo ankoraŭ nun konservas sian plenan valoron. Cetere, ĉu Parizon la Parizanoj ne nomas humorefiere *mia vilaĝo*? Krome ĉu Jozefino Baker, la brunhaŭta varieteo-stelulino, dolĉe-dorlote ne kantadis tra la tuta mondo: *J'ai deux amours, mon pays et Paris* (Du amojn mi havas, mian landon kaj Parizon).

Fakte, se Parizo estas granda, tre granda urbo, malgraŭ sia vasteco, malgraŭ la senĉesa kreskado de ĝia loĝantaro, ĝi konservis en ĉiuj siaj kvartaloj, same en la kernaj kiel en la periferiaj, ian hejmecon etosan, kies influon neniu vizitanto povas ignori. Al kio ĝi ŝuldas tiun rimarkindan, unikan apartaĵon, tio estas demando ne tre facile respondebla. Kredeble, al la propra kaj historia fizionomio de ĉiu el tiuj kvartaloj, kiuj malgraŭ la neeviteblaj ŝanĝoj de la ĝenerala evoluado, restis ĝis hodiaŭ pli-malpli memstaraj. Certe, malpli ol kiam ĉiu el ili estis kvazaŭ apartigita urbeto kun samklasa, sammetia, samkutima loĝantaro. Tamen, ankoraŭ nun, spite la pistadon kaj knedadon de la jarcentoj, tiaj diferencoj inter la diversaj partoj, lokoj, loketoj kaj anguloj de la urbo estas iel senteblaj. La *Latina Kvartalo* restas stampita de la studema kaj petolema studentaro. En la kvartalo *Le Temple* (La Templo) la vizitanton ĉirkaŭas nombraj kaj ombraj generacioj de brokantistoj, fikistoj, kaj luigistoj de malfreŝaj vestoj, dum tute apude, en *Le Marais* (La Marĉo) svarmas butikistoj, etkomercistoj, monpruntistoj, etburĝoj, ankaŭ artmetiistoj . . . . La elnombradon mi ja povus daŭrigi, citi la malvarme pompan kvartalon *St. Germain*, iaman loĝlokon de la altnobelaro, elvoki la malnovan antaŭurbon *St-Antoine*, libere zumantan teritorion de lignaĵistoj kaj meblistoj, kaj tiel plu, kaj tiel plu . . . . Sed al mi mankas la spaco ĉi tie, kaj krome, la afero fintendus vin. Kion mi ĵus diris, tio sufiĉas por komprenigi, ke ĉiu vizitanto povas en Parizo trovi kialojn por senti sin komforte dank' al pli-malpli konsciaj memoroj pri siaj hejmo, metio, profesio, eĉ sopirado. Tiujn delikataĵojn mi ja disvolvis per tro mallertaj manoj kaj tre timas, ke pro mia nekapableco la provita klarigo ŝajnos *obskura* kaj la hejmeca etoso obtuza. Sed ne cedu! Por formi vian opinion atendu ĝis vi estos en Parizo. Tiam vi konstatos kun miro kaj plaĉo, kiel amike

vin akceptas, bonvenigas, la stratoj, la domfasadoj, la placoj, la avenuoj, la bulvaroj kaj ankaŭ—kompreneble—la hoteloj, restoracioj, kafejoj kaj amuzejoj. Tiam vi ekkrios: "Jes ja! la Anglo, la Parizanoj, Jozefino Baker pravas! Parizo estas ĉarma, eta urbego. Parizo estas *mia vilaĝo*. Parizo estas mia dua amo . . . ."

Sed Parizo estas ankaŭ io alia: impona kaj impresa atestanto pri dek kvin jarcentoj de la ĝeneralaj historio kaj evoluado. Ĉe ĉiu paŝo la travaganto frontas al memorigaj signoj pri la evento-sinsekvo: palacoj, bazilikoj, gloraj aŭ funebraj monumentoj, lernejoj, muzeoj, bibliotekoj, kolonoj, statuoj, ĝardenoj, parkoj kaj arte-majeste aranĝitaj avenuo-perspektivoj. Ĉion ĉi detaligi en la kadro de ĉi tiu artikolo estas neeble: mi povos citi nur kelkajn ekzemplojn.

En la koro de la insulo *La Cité* (La Civito), kie grupiĝas preskaŭ ekskluzive publikaj konstruaĵoj, jen la fama katedralo *Notre-Dame*, kies konstruado komenciĝis en 1168 sur la loko mem de antikva, Merovea preĝejo, kiun oni elrubigis jam de la jaro 857. Ne malproksime staras la Juĝopalaco, entenanta en sia sino la Sanktan Kapelon (*Sainte Chapelle*), ĉefverkon de la gotika arto, kiu datiĝas de la regado de Sankta Ludoviko kaj memorigas pri la Krucmilitoj.

Transe de la maldekstra Sejna flankakvo sin trovas la ĉi-jara kongresejo, Sorbonne, sidejo de la Universitato, fondita en 1200, kaj kies solenan amfiteatron certe ankoraŭ ne forgesis la ĉeestintoj de la kongresa malfermo en 1932. En la tuja proksimaĵo staras la Politeknika Lernejo; la malnova preĝejo *Sainte Geneviève* kaj la samnoma biblioteko; la Panteono, sub kies kupolo, kiu atingas altecon de 80 metroj, kuŝas la cindroj de famegaj homoj, militistoj, sciencistoj, ŝtatistoj, poetoj kaj verkistoj, kaj inter ili de *La Tour d'Auvergne*, *Lazare Carnot*, *Victor Hugo*, *Berthelot*, *Emile Zola*, *Jaurès* . . . . La centra halo de la monumento estas ornamita per admirindaj pentraĵoj de *Puvis de Chavannes*. Vid'al-vide, sed transe de bulvaroj *St. Michel*, etendiĝas la Luksemburg-ĝardenoj kun la samnoma palaco—nun sidejo de la Senato—kaj muzeo pri moderna arto. Tiuj ĝardenoj, parte priplantitaj per majestaj kaŝtanujoj, konsistigas plej plaĉan subĉielan ripozejon, kiun tre ŝatas la studentoj, geknaboj, nutristinoj, kaj eĉ kelkaj poetoj, filozofoj aŭ alispecaj revemuloj.

Nun, ni iom accelu nian iradon kaj kuraĝe transsaltu la riveron al ties dekstra bordo. Ni tuj trafas la iame-reĝan palacon *Lowvre*, kies konstruadon komencis la reĝo *Philippe-Auguste*,

daŭn  
Lud  
kom  
jarc  
loĝe  
forb  
sed l  
estas  
paŝa  
pavi  
Lud  
unik  
kiu c  
ŝaŭn  
arbo  
povo  
nevid  
la ne  
flam  
placc  
nefor  
de la  
dekst  
loĝas  
mald  
parla  
Grand  
Sed t  
esper  
kart  
Kie  
Ha!  
mem  
instal  
la ple  
ĉiular  
tipa  
franc  
ojn.  
kun l  
Ke  
mem  
Sed,  
cion.  
Ka  
pri l  
kiujn  
aliaj.  
scene  
de s  
danc  
devu  
liveri  
pri a  
Kiel  
en ki  
piedo  
mi ne  
Pariz  
komp



daŭrigis Karlo V, Francisko I, Henriko II, Ludoviko XIII, eĉ Ludoviko XIV, kaj kiu kompletigis poste, en la komenco de la deknaŭa jarcento, per la starigo de la palaco *Tuileries* kiel loĝejo de la francaj suverenoj. La palaco forbrulis en la jaro 1871 dum la *Parizo Komunumo*, sed la ĝardenoj restis sendifektaj kaj ankoraŭ nun estas la plej belaj en Parizo. Ilin ni trairu rapide, paŝante okcidenten, kaj plej baldaŭ surtretos la pavimon de la Konkordo-placo—iama placo Ludoviko XV. Tie al ni malfermiĝas perspektivo unika en la mondo: la avenuo *Champs Elysées*, kiu de la placo kie monumentaj fontanoj ŝprucigas ŝaŭmantajn akvojn, etendiĝas rekte inter duoblaj arboj-vicoj ĝis la Triumfa Arko pri kies memoriga povo estas nebezzone insisti. Tie, Napoleono I nevideble ĉeestas; tie, nevideble ripozas poreterne la *nekonata soldato*; tie, sur lia tombo flagras la *flamo de la memoro*. La tuto, kiun formas tiu placo, tiu avenuo, tiu monumento, estas absolute neforgesebla kaj kaptas streĉe la tutan atenton de la rigardanto. Li tamen povus palpebrumi dekstren al la strato *Royale*, al *Elysée*-palaco, kie loĝas la prezidanto de la franca respubliko; maldekstren, al palaco *Bourbon*, sidejo de la parlamento; al la ora kupolo de la *Invalides*, al la Granda kaj Malgranda Palacoj, eĉ al la *Eiffel*-turo. Sed tiun lastan eble sufiĉe diskonigis tra la tuta esperantistaro la fanatikaj kolektantoj de poŝtkartoj, bildflanke afrankitaj . . . . .

Kion vi plu havas por vidi, viziti, admiri? Ha! multe pli ol mi povus nur noti! Tamen mi memorigu vin, ke en la palaco *Louvre* estas instalita riĉega muzeo pri belaj artoj, kiu enhavas la plej aŭtentajn, la plej karakterizajn verkojn de ĉiulandaj pentristoj kaj skulptistoj. Ke la Operejo, tipa specimeno de la arkitekturo dum la dua franca imperio, prezentas unuarangajn spektaklojn. Ke en la *Franca Komedio* vi povos konatiĝi kun la plej elstaraj klasikaĵoj el la franca literaturo. Ke en la muzeo *Carnavalet* vi trovos amase memoraĵojn pri la historio de Parizo. Ke . . . . Sed, ho ve! la tempo sendube mankos al vi por ĉion nur ekvidi. Vi tre bezonos elekti . . . . .

Kaj elekti vi bezonos ankaŭ por ekhavi ideeton pri la vesperaj amuzejoj. Krom la du teatroj, kiujn mi ĵus nomis, estas, kompreneble, multaj aliaj. Ankaŭ varietoj okupas ne malmultajn scenejojn. Kaj gastame malfermiĝas la pordoj de sennombraj noktaj kluboj kaj kabaretoj, dancejoj k.t.p., k.t.p. Mi sentas, ke mi eble devus esti iom pli babilema pri tiuj specialaĵoj kaj liveri kelkajn precizojn. Sed mi ne emas paroli pri aferoj, kiujn mi ne konas aŭ nur laŭdire konas. Kiel mi povus flustri eĉ nur unu vorton pri lokoj, en kiujn tia kadukulo, kia mi ne plu riskas meti piedon, ne pro prudeco sed pro singardo? Tamen mi ne maltrankviliĝas pri viaj vesperaj sortoj en Parizo; inter la tiea samideanaro vi facile trovos kompetentajn kaj komplezemajn gvidantojn.

Karl Vanselow:

La Komparo

• *Se sonus en konkursa rondo  
al mi laŭvice tie ĉi  
la lingvoj de la tuta mondo,  
la glorpremion donus mi  
al Esperanto sen hezito  
kun mia plenkovinka pled'.*  
*Havigu lokon laŭ merito  
al tiu sorta florbuked'.*

*En Esperanto belkompone  
kuniĝis per mirinda art'  
el ĉefaj lingvoj pleje bone  
konataj la plej placa part' ;  
De la latina jen la fundo,  
de la itala la belson'  
kaj ĉarmaj vortoj en abundo,  
de l'franca ege multa bon'.*

*De l'angla jen la artikola  
simpleco sen cerbum-turment'  
kaj kara dono de la pola  
la reguleco de l'akcent'.*  
*Jen mia amo kaj fiero  
jam ofte min ravinta tre ;  
germana vort-kunmet-libero  
por ĉiam nova vorto-kre'.*

*Kaj tiel plue, tiel plie  
Jes mi ripetas kun plezur',  
ke Esperanto prenis ĉie  
de ĉio la plej bonan nur.  
Do ĉiu-forie ĝin subtenu  
per via helpe pli kaj pli  
kaj en Parizo partoprenu  
la mondkongreson ankaŭ vi !*

Brendon Clark:

TRIOLETO KAJ RONDELO

Kio estas Trioletto—

Floro, kanto aŭ poemo?

Pelas mia scivolemo:

Kio estas Trioletto?

Se poemo, ĉu terceto?

Se floraĵo, ĉu la semo?

Kio estas Trioletto—

Floro, kanto aŭ poemo?

Mi konfesas pri sekreto,

Kial urĝas la problemo:

Jen la ekzamena temo

Antaŭ via fuŝpoeto:

Kio estas Trioletto—

Floro, kanto aŭ poemo?

**GRAVE:** Notu, ke ĉi tiu numero estas duobla (por Julio-Aŭgusto). La venonta n-ro estos Kongresa numero kaj aperos en Septembro.



Prof. D-ro Ivo Lapenna :

## LA BRITA MOVADO

### UNU EL NIAJ BAZOŝTONOJ

La homo inklinas al ĝeneraligoj. Laŭ kelkaj renkontitaj personoj oni emas juĝi la tutan popolon. Vidinte unu urbon, oni identigas ĝin al la tuta lando. Surbaze de pli-malpli fantaziaj informoj el gazetartikoloj estas kreaĵaj tutaj konceptoj pri aliaj nacioj. Du, tri legitaj libroj de alilandaj aŭtoroj, reproduktaj de kelkaj bildoj aŭ monumentoj en lernejoj lernolibroj—jen la materialo, kiu ofte rajtigas al suverenecaj opinioj pri la artaj strebadoj de aliaj medioj . . .

Eble neniu popolo estis tiel longe kaj tiel konsekvence malkorekte rigardata, taksata kaj priskribata, kiel ĝuste la brita. En la okulo de minimume naŭdeknaŭ procentoj da kontinentanoj Brito estas homo alta, osteca, iom malafabla, tro afereca, malvarma, ĉiam serioza, neinteresita pri arto ; Skoto, krome, estas terure avara !

Kaj la lando ? Ĝin oni konsideras malbela, malseka, nebula, kun nigraj urboj, ĥaladzaj pro fumo !

Sendube sur tiuj insuloj oni povas trovi tie kaj tie ankaŭ homojn ĵus priskribitajn, kiel cetere, en ĉiu ajn lando. Certe kelkaj industriaj regionoj iom nigretas. Inter la Skotoj, kiuj mem fabrikas spritaĵojn pri sia *avareco*, trovigas verŝajne ankaŭ kelkaj tro ŝparemaj personoj. Sed la meza Brito havas absolute nenion komunan kun la tipo de Brito ofte imagita en la menso de meza kontinentano.



Parlamentejo, Londono

Foto de Thos. Cook &amp; Son, Ltd.

Dum mia rondvojaĝo mi vizitis dudekon da urboj. Zigzage mi traveturis per vagonaro, aŭtobuso aŭ aŭtomobilo preskaŭ la tutan landon. Mirinde belaj regionoj viciĝis unu post la alia. Florantaj parkoj de Luton kaj Sheffield, herbejoj kaj mildaj montetoj proksime de Newcastle, imponaj palacoj sur larĝaj spacoj de Edinburgh, montoj kaj kristale puraj lagoj de Skotlando, argentaj riveretoj inter Manchester kaj Nottingham, denove senfinaj parkoj ĉirkaŭ la Universitato de Nottingham, en Cardiff, en Bristol, brilanta blanko de Bournemouth . . . Kaj inter tiu verdaĵo, floroj, lagetoj, ŝaŭmantaj akvoj—grandegaj industriaj centroj, kiel la kolosoj de Newcastle kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ; la urbejo konsistanta el tuta aro da urboj, viciĝantaj unu post la alia de Blackburn ĝis tre, tre sude de Manchester ; Bristol kaj Plymouth ; por ne paroli pri Londono. Tiel la tuta lando lasas impreson de grandega, bele ordigita parko unuflanke, kaj de gigantaj laborejoj aliflanke.

Tamen, pli entuziasmiga ol la lando estas la homo. Brito estas sobra kaj laborema, sed samtempe gaja kaj sincera admiranto de ĉio bela. La konversacio, eĉ la plej serioza, estas interplektita kun aparta humoro. Oni ŝercas senĉese : dum prelegoj, ĉe la familia tablo, en amika rondo. Admirindaj estas la brita gastamo, ĝentileco kaj ĉiurilata afableco. En neniu lando de Eŭropo mi renkontis tiel afablajn homojn kaj tiom da afablaj homoj, kiel ĝuste tie : de la kondukto kaj policisto ĝis la Lordo-Urbestro kaj la universitata profesoro . . .

Se mi ne estus farinta la vojaĝon per Esperanto kaj kun la helpo de la britaj esperantistoj, mi eble ne kuraĝus doni la suprajn opiniojn, timante ke mi mem ĝeneraligos nekorekte. Fakte, post unu-monata restado en iu ajn lando estas malfacile doni objektivan opinion pri ĝi. Sed se oni vojaĝas per Esperanto, tiam dum unu monato oni vidas pli multe, oni konatiĝas kaj eĉ amikiĝas kun pli multe da personoj, ol vojaĝante dum pluraj monatoj, eble eĉ jaroj, sen la helpo de la Internacia Lingvo. Tion oni devas persone ĝisvivi kaj eksenti por povi plene kompreni.

Al  
estas  
pose  
anto  
mov  
la pl  
el la  
en la  
B.E.  
apar  
ofici  
vespe  
direk  
agad  
prezi

La  
orgar  
neeb  
la po  
Cio—  
resta  
arang  
unive  
absol  
realig  
geesp  
mallo  
da p  
oficia  
plura  
perso  
verki

Est  
fariĝa  
estas  
tium  
ĉefaj  
nenia  
komp  
angla  
en la  
scii la  
okazo  
sufiĉe  
vizitit  
kaj vo  
lingvo  
solida

Sen  
malfa  
apart  
kiuj  
celas  
kaj t  
kaj b

La  
prele




Aparte elstara eco de Brito estas lia organizemo. Tiun econ posedas ankaŭ la Brita Esperanto-movado. El ĉiuj landaj movadoj, miaopinie, la brita estas la plej bone funkcia. En unu el la plej belaj partoj de Londono, en larĝa avenuo, estas la sidejo de B.E.A. Ĝi troviĝas en domo apartenanta al la Asocio. Pluraj oficistoj tie laboras de mateno ĝis vespero. Ĝi estas la centro, kiu direktas la tutan poresperantan agadon sub la lerta gvidado de la prezidanto, S-ro W. A. Gething.

La vojaĝon tra la lando organizis B.E.A. Estas vere neeble priskribi en kelkaj vortoj la perfektecon de la organizo. Ĉio—alveturo, forveturo, loko de restado, salonoj de la diversaj aranĝoj, vizitoj al urbestroj, universitatoj, lokaj edukaj aŭtoritatoj k.t.p.—absolute ĉio estis antaŭvidita kaj je sekundo realigita laŭ la plano. Ĝuste tiel ni, t.e. la britaj geesperantistoj kun mia helpo, povis en relative mallonga tempo fari grandegan laboron; kvardeko da prelegoj kaj internaj paroladoj, deko da oficialaj vizitoj al urbestroj, trideko da intervjuoj, pluraj lekcioj en universitatoj, multnombraj personaj kontaktoj kun sciencistoj, ĵurnalistoj, verkistoj, artistoj, k.t.p.

Estas necese akcenti, ke la Internacia Lingvo fariĝas ĉiam pli populara en tiu lando, kies lingvo estas tre vaste konata en la mondo. Koncerne tiun demandon, la Britoj estas divideblaj je du ĉefaj kategorioj. Unuj, plej parte personoj neniam forlasintaj la insulojn, tute ne povas kompreni, ke ekzistas homoj, kiuj ne konas la anglan lingvon. Ili sincere opinias, ke ĉiu homo en la mondo, aŭ almenaŭ ĉiu klera homo, devas scii la anglan. La aliaj, precipe tiuj, kiuj havis la okazon viziti plurajn landojn kaj kiuj ne estis sufiĉe riĉaj por loĝi en la plej luksaj hoteloj de la vizititaj urboj, vidas klare la lingvajn malfacilaĵojn kaj volonte akceptas la ideon pri komuna, neŭtrala lingvo. Krome, por multaj estas tre alloga la solidaria funkcio kaj la paciga rolo de Esperanto.

Sendube por niaj britaj geamikoj estas tre malfacile labori por Esperanto inter homoj apartenantaj al la unua tipo, sed en la medioj kiuj spertis la lingvajn malfacilaĵojn kaj kiuj celas al pli bona interkompreniĝo de la popoloj—kaj tiuj medioj estas tre multnombraj—ili havis kaj havos ĉiam pli da bonaj sukcesoj.

La fakto, ke multnombra publiko ĉeestis la prelegojn, ke ili povis esti organizitaj ankaŭ en



La Kastelo, Edinburgo

Foto de Thos. Cook & Son, Ltd.

pluraj lernejoj, ke la gazetaro tre favore raportis, ke eĉ B.B.C. kvarfoje dum la vojaĝo sciigis pri la diversaj aranĝoj, ke dum la multnombraj kaj ofte longedaŭraj diskutoj aŭdiĝis eĉ ne unu vorto principe malfavora al Esperanto—ĉio ĉi pruvas, unuflanke, ke britaj geesperantistoj agas ĝenerale bone por nia afero kaj, aliflanke, ke la grundo estas tre favora por grandskala plua disvastigo de nia lingvo inter la Angloj, Skotoj kaj Kimroj.

La brita movado estas hodiaŭ tute certe unu el la ĉefaj, eble la ĉefa bazoŝtono de nia tutmonda movado. Tiun gratulindan pozicion ĝi meritas. Se B.E.A. sukcesos formi ankoraŭ kelkajn fortojn, verajn societojn tra la lando; se ĝi, precipe, sukcesos krei almenaŭ kelkajn intelektulajn grupojn en la universitatoj aŭ nur en la universitataj urboj, tiam la Internacia Lingvo, tute certe, progresos ankoraŭ pli bone ne nur en ilia lando, sed, pro la emo imiti la grandajn popolojn, ankaŭ en la tuta mondo.

\* \* \*

*Ni deziras esprimi dankon al la firmo Thos. Cook & Son pro afabla prunto de la bildoj en ĉi tiu artikolo.—Red.*

**PREMIO de 10,000 liroj** por la gajnonto de la poezia konkurso de U.E.A. Ĉiuj poetoj, kiuj partoprenos la Literaturan Konkurson de U.E.A. (vidu la regularon en la aprila n-ro de *Esperanto*) branĉo (1), poezio originala, estas kandidatoj al premio de 10,000 italaj liroj, destinitaj por la plej bona lirika poemo en la lingvo Esperanto de la konkurso Paneŭropo. La gajnonto, kune kun la du aliaj plej bonaj poetoj de la U.E.A.-konkurso, partoprenos, krome, kiel kandidatoj en la Paneŭropa Konkurso pri lirika poezio de la lingvoj Esperanta, angla, franca, itala kaj germana. La unua premio en tiu konkurso estas italaj liroj 100,000, do proksimume 150 dol.



## LA PRELEGOJAĜO EN BRITUJO

**Brila sukceso**

*W. A. Gething*

Multaj Britoj nun pli bone komprenas, kial la reputacio de Profesoro Doktoro I. Lapenna tiel alte staras, ĉar ili havis okazon renkonti lin, paroli kun li kaj admiri lian oratoran arton.

En la daŭro de unu monato li ĉirkaŭiris la tutan landon kaj ĉie li faris vere brilan impreson kaj altiris la atenton de la publiko al la Esperanta Movado. En ĉiu vizitita urbo aŭ urbego la Esperantistoj bone reklamis la viziton per afiŝoj, cirkuleroj, leteroj kaj gazetreklamoj, kaj aranĝis tre taŭgan programon. En ĉiu urbo Prof. D-ro Lapenna plenumis sian parton de la programo laŭ perfekta, plej digna kaj ĉiel admirinda maniero. Tipa programo estis:—

Lunĉo kun iu Societo de lokaj eminentuloj (ekz. Rotario),

Vizito al la Urbdomo kaj prezento al la Lord-Urbestro aŭ Urbestro,

Te-festeto kun la loka grupo, kun intima parolado pri aŭ la lingvo aŭ la movado,

Publika parolado pri :

- (a) Jugoslavujo, lando de pitoreskaj urboj
- (b) La internacia juro aŭ
- (c) La Esperanta movado.

Kompreneble li evitis ian ajn aludon al politiko kaj laŭ la poste ricevitaj raportoj de la grup-sekretarioj li ĉiam agis kaj parolis—ĉu antaŭ eminentaj ne-Esperantistoj, ĉu antaŭ spertaj aŭ nespertaj Esperantistoj — kiel entuziasma, inspirita samideano, kies sola celo estas disvastigi la bonfamon de nia lingvo. Spaco mankas por presigo de eĉ partoj de la detalaj raportoj, kiujn ensendis la sekretarioj, sed jen po unu frazo el ĉiu:—

*Luton* : Ili konfesis profundan admiron al la brila oratoro, kiu tamen samideane kaj amikece babiladis eĉ kun komencantoj.

*Sheffield* : La postlasitaj fajreroj longe flagros en nia rondo.

*Newcastle* : . . . . iom de lia vicleco, de lia granda entuziasmo por Esperanto kaj ĝia interna ideo postrestis lin en la Nordoriento.

*Edinburgh* : Li stimulis la grupon per konstruecaj konsiloj.

*Glasgovo* : D-ro Lapenna donis al ni kuraĝigan paroladon. Li ankaŭ forte instigis nin aliĝi al U.E.A.

*Carlisle* : . . . . la plej bona propaganda manifestacio, kiun ni ĝis nun entreprenis.

*Blackburn* : Ĉio iris glate . . . .

*Manchester* : . . . . ĉiu entuziasmiĝis pri la tuta afero kaj deklaris ĝin tutplena sukceso.

*Nottingham* : Li provizis veran stimulon al la klubo.

*Birmingham* : Li provizis tre valoron stimulon.

*Cardiff* : . . . . nepre inspira sperto.

*Bristol* : . . . . la lokaj geesperantistoj ricevis inspiron kaj kuraĝigon.

*Plymouth* : Ni tre dankas pro la okazo ricevi kaj uzi tian eminentan Esperantiston.

*Bournemouth* : Ni estas kortuŝitaj, ricevinte la okazon renkonti tiel admirindan personecon.

*Londono* : Pro la konata reputacio . . . . ensvarmis membroj . . . . kaj dum la plej elokventa parolado ĉiu absorbiĝis.

La movado en Britujo ricevis tre valoran helpon, kaj en la nomo de B.E.A. mi kore dankas al U.E.A.



*La populara Komisiito de U.E.A. por prelegvojaĝoj, Prof. D-ro Ivo Lapenna*

### ĈINA SPRITO

Kio estas bonstato? Ĉina spritulo respondas :

Se la plugiloj de la kamparanoj brilas kaj la sabroj de la soldatoj rustas.

Se la grenejoj estas plenaj kaj la malliberejoj sen arestitoj.

Se la ŝtuparoj de la temploj estas uzataj kaj sur la ŝtupoj de la tribunaloj kreskas herbo.

Se la kuracistoj iras piede kaj la bakistoj iras sur ĉevaloj.

Se ekzistas multaj maljunuloj kaj multaj infanoj.

Min  
nomon  
depend  
eldonin  
ke li ne  
La fo  
de nia  
agado e  
evident  
milito p  
la estra  
konstar  
atingita  
oficialig  
La  
"post la  
la kvina  
por ut  
propaga  
U.E.A.  
la par  
U.E.A.  
U.E.A.  
rigore f  
Ĉiu obje  
kaj la k  
povas  
tendenc  
politiko  
Por  
gardi s  
aprobit  
internac  
ligi la  
neŭtrale

Franca  
Malgr  
situacio  
estas ar  
milito.  
paradok  
la gene  
multobl  
de la et  
povas k  
preskaŭ  
Sed li  
ne plu  
individu  
oficistoj  
multobl  
kolektiv  
diversaj  
k.t.p.—



## “PROBLEMOJ”

E. Malmgren, Prezidanto

Min atingis multobligita folio, kiu portas la nomon “*Problemoj*”, kun la subrubriko “*Sendependa gazeto politika kaj informa*”. La eldoninto estas anonima, kaj mi bone komprenas, ke li ne kuraĝas publikigi sian nomon.

La folio pretendas malkaŝi la “*bedaŭran staton de nia movado, en kiu ĝi troviĝas pro la subfosa agado de kvina kolono*”. La anonima verkinto evidente ne scias, ke U.E.A. kreskis post la milito per **almenaŭ 1,000 membroj ĉiun jaron**, ke la estraro de U.E.A. ellaboris laborplanon por la konstanta evoluo de la movado kaj ke jam estas atingitaj ĝojgaj, eĉ imponaj rezultoj por la oficialigo de Esperanto en la instrua medio.

La verkinto de la pamfleto ankaŭ asertas, ke “*post la restarigo de organizita laboro en Eŭropo la kvina kolono tuj penis kapti nian ĉefan organizon por utiligi ĝin por sia politika kaj ideologia propagando*”. Kiu konas la estraranojn de U.E.A., komprenas la absurdan kalumnion. Ĉar la pamfleto speciale nomas la prezidanton de U.E.A. kiel ĉefe respondecan por la gvidado de U.E.A., mi ne povas ne konstati, ke mi ĉiam penis rigore forigi ĉion politikan el la kadro de U.E.A. Ĉiu objektiva observanto, kiu ĉeestis la kongresojn kaj la komitatkunsidojn de U.E.A. post la milito, povas atesti, ke mi favoris nenium politikan tendencon, kaj ke mi ne toleris enmikson de politiko en la laboron de nia asocio.

Por esti tute certa pri tio, ke U.E.A. povu gardi sian neŭtralecon, mi eĉ proponis (poste aprobita de la komitato), ke “*en U.E.A. kiel internacia organizaĵo la membroj ne havas la rajton ligi la nomon de U.E.A. kun iu temo, pri kies neŭtraleco ne ĉiuj komitatanoj, resp. estraranoj,*

*konsentis*”. Tiu teksto klare montras, ke mi preskaŭ pedante gardas la neŭtralecon de U.E.A. Kial? Nu, ĉar mi—kiel praktika, racia homo—nepre volis eviti disputojn pri flankaj problemoj, por ke ĉiuj membroj de U.E.A. povu dediĉi sin plene al la propagando de Esperanto. Ĉu miaj penadoj estis vanaj?

Estrarano d-ro Lapenna bonvolis laŭ mia propono dum certa tempo forlasi sian ordinaran oficon kiel universitata profesoro por servi la Esperanto-movadon kiel sendito de U.E.A. Estis interkonsento, ke li en sia agado kiel oficiala reprezentanto de U.E.A. rigore observu politikan neŭtralecon. Post la fino de la nunjara sukcesa agado de d-ro Lapenna en Francujo, Islando kaj Britujo mi konstatas, ke li lojale agis laŭ la interkonsento kaj ke li cetere faris unike merititan laboron por vigligi la movadon. El Islando ekz. mi ricevis raporton pri lia granda signifo ne nur por vigligi la esperantistojn sed ankaŭ por krei respekton kaj atenton al Esperanto inter oficialaj rondoj.

Kaj personon, kiu faris tiun laboron, ne profitante monon, ne kolektante meritojn por sia ofico, sed direktite de pure idealista ardo plifortigi nian movadon,—tiun personon la pamfleto intriganto nomas “*lupo en ŝafida felo*”. Per tiu frazo li priskribas sin mem.

Ĉar perfidulo estas tiu, kiu volas semi malpacon inter amikoj. Perfidulo estas tiu, kiu suspektas la bonan volon kaj la bonan intencon de la elektitaj gvidantoj. La malamikoj de Esperanto ne povus trovi pli bonan apostolon ol tiun, kiu kreas malfidon inter la esperantistoj.

Sed ni kiuj dediĉis el pura idealismo nian tempon, ĉu jarojn ĉu jardekojn, al nia movado, ni malĝojas, ke troviĝas en nia rondo tiel malnobla *samideano* kiel tiu anonima pamfleto eldoninto.

### Franca Vivnivelo (*daŭrigo de p. 102*)

Malgraŭ tiu ĵus menciita normaligo de la situacio, la aĉetpovo de la salajroj en Francujo estas ankoraŭ sufiĉe malpli granda ol antaŭ la milito. Unuavide, tiu konstato povus ŝajni paradoksa kaj miriga, ĉar laŭ la oficialaj statistikoj la ĝenerala preznivelo, kompare kun 1938, multobligis je 20, dum la tuta salajrokvanto pagata de la entreprenoj multobligis je 18. El tio oni povus konkludi, ke la nunaj realsalajroj atingis preskaŭ sian antaŭmilitan staton.

Sed la *interna strukturo* de la franca salajraro ne plu estas la sama, kiel antaŭ dek du jaroj. La *individuaj* salajroj, kiujn la salajrulo (laboristo aŭ oficisto) ricevas *rekte* ĉiusemajne aŭ ĉiumonate, multobligis nur je 12 aŭ 13. La diferenco estas *kolektiva* salajro, kiun la entreprenoj pagas al diversaj kaso—socia asekuro famili-subsencioj k.t.p.—kaj kiuj profitas al la malsanuloj kaj al la

infanriĉaj familioj. Antaŭ la milito tiu kolektiva salajro konsistigis nur 15% de la individua salajro; ĝi atingis 36% en 1948 kaj altiĝis ĝis 45% en 1949. Tio signifas, ke preskaŭ triono de la salajroj ne estas je la libera dispono de tiuj, kiuj ilin perlaboris, sed fluas aŭtomate en la poŝojn de la specialaj, laŭleĝe difinitaj kaj rajtigitaj kategorioj de la laborularo.

La sekvo de tiu interna struktur-ŝanĝo de la francaj salajroj estas, ke el 13 milionoj da salajruloj, kiujn oni nombras en Francujo, proksimume tri milionoj vivas nun pli bone ol antaŭ la milito, kaj proksimume dek milionoj **multe malpli bone**. Tiu fakto klarigas la kialon de la oftaj laborkonfliktoj, kiujn trairis nia lando dum la lastaj jaroj; ĝi ankaŭ komprenigas, ke daŭra plibonigo de la vivnivelo de la franca laborularo povas esti certigota nur danke al plialtigo de la produktiveco de la franca ekonomio.



Ritchie Calder :

# HOMOJ KONTRAŬ LA DEZERTO

*Teherano*

Alirante al Teherano aviade, oni ricevas ege strangan impreson, kvazaŭ estus okazinta peza bombado—ne sur la ĉefurbon sed sur la ĉirkaŭan kamparon. La pejzaĝo estas variolpunkte markita de krateroj, kvazaŭ de la plej eksterordinara desegno-bombado. La krateroj estas laŭ regulaj linioj, pensigantaj pri vicfaloj de bomboj, sed ili interkruĉiĝas kaj transplektiĝas. Troviĝas nenio simila en la mondo, ekster batalkampoj dum milito.

Scivolo pri ĉi tiuj krateroj logis min ne nur trans la landon, sed malproksimen en ĝian historion. Ĉi tiuj krateroj estas antikvaj *kanatoj*—miriga akvosistemo de tute persa origino. Ili similas al la *foggara* kiujn mi vidis apud Beni Abbes en Saharo.

*Kanatoj* estas putoj, horizontalaj anstataŭ vertikalaĵoj. La krateroj estas la aliraj kaj ventolaj ŝaktoj, similaj al la ŝaktoj en karbminejoj, kaj ili simile celas al la vejnoj—ĉi-foje akvoportaj tavoloj.

Dum 5.000 jaroj persaj sapeistoj estas fosintaj kaj malsuprenirintaj ĉi tiujn ŝaktojn. Atinginte la malsupron de akvoporta tavolo, ili horizontale sapeas ĝis proksima putoj, kiu povas troviĝi 50 metrojn for. Por direktiĝi ili uzas tre primitivan magnetan kompason—praktiko tiel malnova, ke iuj asertas, ke la Persoj inventis la kompason longe antaŭ ol la marnavigaciistoj ĝin bezonis.

Troviĝas ĉirkaŭ 50.000 kanatoj—ne putoj, sed sistemoj—en Persujo. Kelkaj ĉirkaŭ Persepoliso funkcias senĉese jam de 2.000 jaroj. La produkto varias de 15 ĝis 135 litroj da akvo ĉiusekunde. La plej profunda vertikala ŝakto penetras 1.000 futojn, kaj unu *kanato* havas longon de proks. 30 anglaj mejloj (proks. 50 km.).

*Kanatoj* kutime estas komuna entrepreno de du bienuloj—unu posedanto de alte situanta sed malriĉa tero, kaj la alia, plurajn mejlojn for, posedanto de riĉa sed senakva tero. En interligo ili kreas ĉi tiujn drenilojn por dolĉa akvo. Kiam la akvo eliĝas el la subtero kaj fluas en malfermaj kanaletoj ĝi estas distribuata per pli grandaj kanaloj tra vilaĝoj kaj urboj. Eĉ tra Teherano mem la akvo fluas senŝirme en kanaloj el kiuj oni ĉerpas trinkakvon kaj en kiu oni ankaŭ lavas vestojn! Estus granda risko trinki ĝin post traŭro tra la urbo!

Akvo reliefe grandegas en la Sepjara Plano por la rebonigo de Persujo. El projektita budĝeto de £210 milionoj, 23% estas asignota por irigacio kaj agrikulturo. Ĉi tiu Sepjara Plano estas gvidata

de Princo Abdul Reza, la agema juna frato de la persa reĝo, kaj administrata de D-ro M. Naficy, mirinda persono laŭ iu ajn kriterio. La ĝenerala organizado estas farata de grupo de specialistoj, plejparte Usonanoj. Kontraste kun Egiptujo, kiu ricevas akvon el aliaj landoj, 66% de la pluvakvo forfluas el Persujo en la najbarajn landojn, kaj S-ro Olivier, brita hidrologo en ĉi tiu organizo, pripensas grandajn projektojn por konservo de granda parto de ĉi tiu forfluo. Li opinias, ke sur la konate fekundaj sed sekaj areoj oni povus subteni po 7 personoj por ĉiu akreo por irigacio. Malgraŭ sia grandeco Persujo nun subtenas nur 15 milionojn personojn, sed devus esti eble altigi la vivnivelon, nun mizeran por la malriĉuloj. En unu loko oni nun tranĉas tunelon por devojiĝi parton de rivero por irigacii 60.000-akrean terenon apud la oazoj de Isfahano. Ĉi tiu projekto unue estis pripensata antaŭ 350 jaroj!

Oni krome havas grandajn planojn pri forstado. Per arboj oni povus haltigi erozion kaj konservi la negakvon tiel ke ĝi iom malpli frue kaj malpli rapide degelos kaj pli modere fluos de la montoj, anstataŭ torenti valen, kiel kutime. Ĝenerale la Sepjara Plano celas fari uzon el kaj bonon al terenoj jam ekspluatataj, sed kie la vivo estas mizera.

## *Kum, la persa saldezerto*

Transirante la grandan salan dezerton de norda Persujo, svisa geologo kun mi ekscitiĝis ĝis ekstazo. Eĉ por mi post du monatoj da dezertvojaĝado ĝia beleco estis evidenta kaj konfesinda. Sed por la Sviso ĝi estis kompare ege pli bela. Li rigardis ĝin per okuloj de geologo, kiu dum jaroj estis en ĝangaloj de Suda kaj Centra Ameriko, kies geologiaj formacioj estas vestitaj per luksaj verdaĵoj; sed ĉi tie la grundo estis forbalaita kaj la formacioj prezentigis nudaj al la vido, fenditaj kaj krevitoj ĝis ĉiuj tavoloj kaj vejnoj klare videblas.

Okcidente de la sankta urbo Kum estas monto de salo. De ĝi mi vidis kamelojn forporti laŭ longaj vicoj grandajn bulojn de salo. Mi penetris tra roka krevoj en minejon, kie oni eksplode disrompas pecojn de salo por transporto. Tie mi lernis multon pri la stranga altebenaĵo, suprelere forma, kreita de la premoj kaj ŝrumpiĝoj de la tersurfaco, kiuj levis ĝin el sub la profundo de la maro. Dezertoj kovras duonon de Persujo; du trionoj el ili estas salvenenitaj.

Malgraŭ tio, ke Persujo povus forgesi pri la ekspluato de siaj dezertoj pro ekzisto de alia pli kultivebla tero, ĝi tamen ne povas ignori la

kontraŭ  
sablo,  
konkeri  
vojon  
Sepjara

Miks  
al la  
pop-op-  
aviadil-  
aeropre-  
metrojn  
serpent  
Nuboj  
pejzaĝo  
ombro  
la Trar  
por mi  
Kelk  
situis a  
Jen po  
Esta  
vastan  
fiŝboato  
kreskan  
aspekto  
grandiĝ  
Tibe  
akomp  
Flugan  
la ebl  
valo.

Li e  
konser  
dezerto  
de Un  
naskiĝi  
ke anst  
300 m  
rivero  
155.000  
ankorat  
devojiĝ  
Por  
ambicia  
Medite  
ĉirkaŭ  
Tamen  
inter d  
okazis  
ŝtato  
Jorda  
projek  
estas  
esti r  
\* T  
Aŭtor  
Usona



kontraŭ-ofensivon. Alie la blovataj salo kaj sablo, kaj erozio per akvo kaj vento povus konkeri florantajn oazojn se oni ne barus la vojon al la sieĝanta dezerto. Tion celas la Sepjara Plano.

*Galilea maro*

Miksaj sentoj sieĝis min dum mia malsupreniro al la Galilea Maro. En miaj oreloj sonis *pop-op-op*-ado simile kiel dum descendo en aviadilo, kaj pro la sama kaŭzo—varianta aeropremo. Galileo troviĝas 682 futojn (206 metrojn) sub la marnivelo. Krome la vojo estas serpentuma kaj kruta, kreanta en mi nervemon. Nuboj amasiĝis super la Jordana valo kaj la pejzaĝo prezentis kontrastan bildon de suno kaj ombro dum ŝtormo ŝvebe pendis super Baŝano, la Transjordana ebenaĵo. Kun la fizikaj kaŭzoj, por miaj sentoj miksiĝis emociaj.

Kelkete da metroj super izola juda posteno situis arabaj linioj kiujn okupis la Araba Legio. Jen politika fendego krom la geologia.

Estas ankaŭ alia konflikto. Rigardante la vastan etendiĝon de ĉi tiu dolĉakva maro kun fiŝboatoj prancantaj kaj skuiĝantaj en la kreskanta ŝtormo, mi penis imagi al mi, kiel aspektos la sama sceno kiam la lago estos malgrandigita ĝis duono—eble post nur dek jaroj.

Tiberias ĉe Galilea Maro estis mia rendevuo en akompano de D-ro Walter C. Lowdermilk. Flugante super ĝi antaŭ 11 jaroj, li antaŭvidis la eblon de nova T.V.A.\*-projekto por la Jordana valo.

Li estas asistanta estro de la Usona Grundkonserva Servo kaj estas studinta home faritajn dezertojn en 38 landoj. En 1949 li estis prezidanto de Unesco-Komisiono pri Sekaj Regionoj, el kio naskiĝis la ideo pri nia nuna vojaĝo. Li sugestis, ke anstataŭ flui en la salan lagon, Morta Maro, 300 metrojn sub marnivelo, la dolĉakvo de la rivero povus esti devojigata por irigacii ĉirkaŭ 155.000 akreojn en la valo. Sed ĝi povus akvumi ankoraŭ kvinoble pli grandan terenon per alia devojigo.

Por kompensi la Mortan Maron li proponis ambician projekton, kanali kaj tubi akvon el la Mediteraneo apud Haifo kaj uzi la falon de ĉirkaŭ 300 metroj por produkti elektropotencon. Tamen lia projekto dependas de paca kunlaboro inter diversaj ŝtatoj. De la tempo de ĝia genezo okazis la Jud-Araba milito kaj naskiĝis la nova ŝtato Izraelo; kaj pro sia situo la araba ŝtato Jordano sendube havos parolon en la sorto de la projekto. La fundamento de la projekto tamen estas tiom provizita per alternativoj, ke ĝi povos esti realigata en la kadro de la izraela ŝtato eĉ

\* T.V.A.—Tennessee Valley Authority (Tennessee-vala Aŭtoritato). Fame konata kontraŭ-erozia projekto en Usono.

se manko deinterkonsento kun najbaroj malhelpos alian solvon. Intertempe drenado de marĉoj kaj aliaj hidrologiaj laboroj estas plenumataj tiel ke ili povos enkadriĝi en la ĝenerala projekto se necese.

*Beer-Ŝeba, Izraelo*

Por fari viziton al ĉi tiu regiono mi estis devigata porti pafilon, kaj ĉiu el ni ricevis averton teni la pafilon pafpreta. Araboj estis en la regiono, kaj ambaŭ flankoj senaverte pafas kontraŭ la malamiko. Feliĉe mia vizito okazis en paco.

Mi vidis koloniojn farmatajn de avangarduloj, inkluzive de junaj virinoj. Antaŭ kvin jaroj regis sendispute la dezerto kaj intertempe la tereno estis batalejo. Pluvakvo preskaŭ neniomas, sed oni jungis vadion laŭ kiu akvo torentas proksimume trifoje ĉiujare. La fluego estas direktata per flutranĉeoj en kanalojn por irigacii la kampojn aŭ por plenigi grandan asfaltan konservbasenon, kiu povas enteni 80.000 kubajn metrojn da akvo.

La kampoj estas prilaboritaj laŭ nete deklivaj terasoj por ke la akvo malrapide superfluu de unu en alian. Tuj post la akvumo oni plugas por konservi la akvon, kaj semas. Tio estas la tuta malsekaĵo dum la kreska periodo ĝis rikolto.

Mi vizitis ankaŭ la ruinlokon de antikva Bizantia urbeto Subetta, nur ĵus elfosita. Kuriozaĵo estas, ke ĝis la limo de la vido la montoj ĉirkaŭe estas kovritaj de geometrie aranĝitaj amasoj da silikŝtonoj. Ili estas roskondensiloj eble 3.000-jaraĝaj! La malvarmaj ŝtonetoj kondensas la akvon el la atmosfero dum la nokto kaj ĝi fluas en la bazon de la amaso kaj de tie penetras en la teron. Oni povus nur supozi, ke per ĉi tiu maniero Subetta, kiu estis granda urbo, sukcesis vivteni sin per legomoj k.t.p. La antikvuloj almenaŭ sciis solvi la problemon de vivtenado en tre seka regiono, sur silikŝtona dezerto.

En la Weizmann Instituto ĉe Rehovot mi vidis kiel la modernuloj klopodas solvi la saman problemon laŭ aliaj vojoj. Oni havas distilaparatojn en kiuj la sunradioj vaporigas la akvon, kaj la akvo kondensiĝas en alia parto. Tamen distilita akvo ne estas tre praktika por multaj celoj. Alia metodo estas la jon-interŝanĝa aparato. En unu tubo la sala akvo perdas sian natrion, en alia la kloro estas ekstraktata, kaj en la daŭro de unu tago dek tunoj da akvo estas sensaligataj ĝis la grado dezirata.

Ankoraŭ unu rimedo eksperimenta estas la sternado de nilonaj ŝtofoj sur salecajn kampojn por kondensigi sur ili dolĉan akvon. La nilono

*(daŭrigo sur sekvanta paĝo)*



Lucien Laurat :

## Rimarkoj pri la Franca Vivnivelo

Absoluta komparo inter la vivniveloj de diversaj popoloj, eĉ najbaraj kaj kontakto-kutimaj, estas malfacila. Tiu malfacileco estas la sekvo de la malsameco de la vivokutimoj unuflanke, de la diverseco de la naciaj leĝaroj aliflanke. Eĉ se la statistikistoj konstatas, ke la meza jar- aŭ tag-konsumo de kalorioj en du landoj estas samgranda, tiu kalorikvanto konkretiĝas sub formoj tiel diversaj, ke homo de unu lando povas havi la impreson, okaze de vizito en la alia lando, ke oni tie vivas malpli bone, kvankam nur la *dispartigo* de la kalorioj estas malsama.

Je la fino de la pasinta jaro la *Monthly Labour Review* publikigis, post serioza kaj profunda enketo, kompar-tabelon pri la aĉetpovo de la salajroj en diversaj landoj, el kiu rezultas, ke la *reala* salajro (la salajro esprimita per varkvanto) en Aŭstralio kaj Usono estas proksimume la trioblo de la franca realsalajro, kaj ke la aĉetpovo de la salajroj en Svedujo kaj Britujo estas la duoblo de la franca aĉetpovo.

La nomitaj proporcioj estas kalkulitaj ne laŭ supraĵa, ĝenerala taksado, sed post detala kaj zorgema konsidero de la vivkutimoj kaj vivmanieroj de la koncernaj nacioj. Kaj tamen mi

### Homoj Kontraŭ la Dezerto (*daŭrigo*)

povas esti farata el ricino; eble tiu planto baldaŭ fariĝos egale grava en la ekonomio de Izraelo, kiel la citron-arboj. Alia ideo estas la uzado de naĝantaj grajnoj de nilono sur konservata akvo por ke ili reflektu la sunradiojn kaj tiel minimumigi la forvaporigon.

\* \* \*

Do jen mi venis al la fino de mia vojaĝo. El la spertoj gajnitaj mi revenis hejmen kun abunda espero, kaj kun la scio, ke la dezerto povas kaj devas esti venkata. Venkante en sia lukto kontraŭ malamika sekeco, la pacbatalantaj homoj devigos al la dezerto cedi kaj fariĝi floranta.

Ĉi tiu estas la lasta el 4 artikoloj de Ritchie Calder. U.E.A. publikigis ilin en kunlaboro kun UNESCO kaj la angla ĵurnalo *News Chronicle*. Represo kaj/aŭ traduko de la artikoloj estas permesataj kondiĉe, ke oni meĉciu la fontojn *News Chronicle* kaj *Esperanto*. La bildojn oni ne rajtas reprodukti. Pro aĉfbla prunto de la foto sur la frontkovrilo ni esprimas nian dankon al S-ro C. M. Houghton.

Dum la tuta serio la redakcio ricevis grandan helpon el multaj lokoj kaj konstatis la simpatian kunlaboron de pluraj instancoj. Al ĉiuj ni esprimas nian grandan dankon. Specialan dankon, nome de niaj legantoj, ni direktas al S-ro E. D. Durrant, U.E.A.-komisiito pri Unesco-aferoj, kiu faris la resumojn kaj tradukojn de la originalaj artikoloj en la angla lingvo.—Redakcio.

kuraĝas aserti, ke Franco, apartenanta eĉ al malpli bone pagataj tavoloj de la laborularo, estus malfeliĉa, se li devus daŭre manĝi kaj trinki laŭ la usonaj aŭ britaj kutimoj.

Jam delonge estas konata fakto, ke la Francoj (same kiel iugrade ankaŭ Belgoj, Italoj, Aŭstroj kaj Ĉeĥoj) preferas elspezi pli altan procenton de sia gajno por manĝo-ĝuado kaj relative malpli altan proporcion por—ekzemple—loĝejkomforto. Sed eĉ tiurilate ciferoj nekomentitaj povas doni faisan aŭ trompan impreson. De la unua mondmilito la francaj luprezoj estas severe fiksitaj kaj reguligitaj; dum la ĝenerala preznivelo jam de tiam centobligis, la leĝo tenis la loĝejluon sur preskaŭ konstanta ŝtupo tiel, ke la lupago, kiu konsistigis antaŭ tridekkvin aŭ kvardek jaroj proksimume unu dekonon de la elspezo familia, finfine malaltiĝis dum la lastaj jaroj ĝis nur 2% aŭ 3%. Se la luprezoj estus en Francujo sur sia antaŭa (t.e. normala) nivelo, la loĝejelspezoj do reprezentus kvazaŭ 10% de meza familia budĝeto. Estas necese aldoni, ke de antaŭ du jaroj, laŭ nova leĝo, la lupago estas iom post iom je regulaj intervaloj—plialtigata; ĝi sekve atingos sufiĉe baldaŭ sian normalan proporcion. Sed tiuj normalaj dek procentoj estas multe malpli ol la 20 aŭ 25 procentoj kutime elspezataj por loĝado en la anglalingvaj landoj aŭ en Svislando. Laŭ sufiĉe fidindaj enketoj tiu diferenco en la vivokutimoj estas konstatata ankaŭ en Svislando inter francaj kaj germanaj Svisoj, kaj en Kanado inter francaj kaj anglaj Kanadanoj.

\* \* \*

Dum la teruraj jaroj de la okupado kaj dum la unuaj jaroj post la liberigo, la ĝenerala mizero estis tia, ke almenaŭ 85% de la familiaj elspezoj servis al aĉeto de nutraĵoj, kiujn oni devis nepre akiri sur la tiel nomita *nigra merkato*, ĉar la manĝaĵoj laŭkupon haveblaj ne sufiĉis por la vivo. Tial ke en eksterlando oni ofte miris pri tiu *maldisciplino* de la franca popolo, mi devas substreki, ke tiu *maldisciplino* estis la sola rimedo, ne morti! Ekzemple dum la vintro 1947-8 la oficiale disponigitaj porcioj estis: 200 gr. da pano (ĉiutage), 750 gr. da sukero (ĉiumonate), 100 gr. da fromaĝo (ĉiumonate), 500 gr. da grasajoj (ĉiumonate)—el kiuj nur 20 gr. da butero! Se la kuponproporcioj en Britujo estus same mizeraj, ankaŭ tie floradus la *nigra* sistemo.

Post kiam la situacio normaligis, la proporcio de la nutraĵoj en la familiaj elspezoj malaltiĝis; ĝi nun atingas inter 50 kaj 60 procentoj.

(*daŭrigo sur p. 99*)

T R



4ŝil. 6p.

Jen n...  
nomita p...  
tiu verko...  
novelo V...  
kaj en ĝi...  
bulgaraj...  
dum la...  
Bulgarin...  
al trupo...  
pri du im...  
mortinta...  
Vasil L...  
Kurbvojo...  
La ple...  
bulgaroj...  
subprem...  
havas va...  
la evoluc...  
Vazon p...  
de la pat...  
suferoj, j...  
atmosfer...  
estas ver...  
La pri...  
bona, a...  
Makedon...  
avino en...  
verko de...  
certe tiu...  
amis sia...  
La sti...  
energion...  
temo. ...  
ne ating...  
eble en l...  
kun mir...  
La t...  
vidas la...  
Ĉu vint...  
Esperan...  
presera...  
Tam...  
kiel bi...  
leginda

Rice...  
de Pe...  
Hipsle...  
Anglu...



# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe U.E.A.



**\*Vagabondoj** : Iv. Vazov. El la bulgara tradukis Iv. Kovačev. Eld. Bulgara Esperantista Kooperativo. 20.7 × 14.5 cm. 112 p. broŝ. prezo

4ŝil. 6p.

Jen nova libro de Ivan Vazov (1850–1921) nomita patriarko de la bulgara literaturo. En ĉi tiu verko troviĝas novelo kaj kvar rakontoj. La novelo *Vagabondoj* donas la nomon al la verko, kaj en ĝi la aŭtoro donas al ni veran bildon de la bulgaraj politikuloj kiuj elmigris al Rumanujo dum la lastaj jaroj de la turka jugo. *Unu Bulgarino* priskribas maljunan virinon, kiu helpas al trupo de partizanoj. *Ĝu li venas?* estas rakonto pri du infanoj, kiuj vane atendas la revenon de sia mortinta frato. *La pura vojo* epizodo el la vivo de Vasil Levski, bulgara patrioto, kaj *Tra la Kurbvojoj* rememoraĵoj el la vivo de la aŭtoro.

La plej grava temo de ĉiuj estas la lukto de la bulgaroj por la libereco, kiam la turkoj ilin subpremis dum la 19-a jarcento. La libro do havas valoron pro la informo, kiun ĝi donas pri la evoluo de la politika vivo en Bulgarujo. Ivan Vazon pentras varian kaj vivan bildon de la vivo de la patriotoj dum tiu periodo de lukto, de iliaj suferoj, iliaj ĝojoj kaj, super ĉio, ilia kuraĝo. La atmosfero estas iom severa, sed la fina impresio estas vere inspira pro ĉi tiu mirinda kuraĝo.

La priskribo pri la diversaj personoj estas tre bona, aparte pri la patriotoj Strangata kaj Makedonski en la novelo *Vagabondoj*, kaj pri la avino en *Unu Bulgarino*. Ni rimarkas ofte en la verko dolĉan emocion vekitan de virinoj, kaj ni certe tion ŝuldas al la fakto, ke Ivan Vazov multe amis sian patrinojn, kiu cetere multe influis lin.

La stilo de Ivan Vazov havas rapidecon kaj energion. Ĝi estas rekta kaj bone taŭgas por la temo. Tamen ĉar la verko estas tro tendenca ĝi ne atingas al la plej alta nivelo de literaturo, krom eble en la rakonto *Ĝu li venas?* Tiu estas rakonto kun mirinda ekonomio de stilo kaj klasika formo.

La traduko havas multajn erarojn. Ni ne vidas la neceson enkonduki la sufikson *oz* (el Ido). Ĉu *virtoza* havas pli precizan signifon ol la Esperanta *virta*? Krome troviĝas tro da preseraroj.

Tamen oni povas rekomendi la verkon, ne nur kiel bildon pri pasinta periodo, sed ankaŭ kiel legindaĵon.

R. M. Dhonau

**Ricevita : Kio estas Pensologio?** Klariga listo de *Pensologiaj Libretoj*. Eldonitaj de F. W. Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Anglujo.



# NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

## Pri "La alia Ameriko"

Kun granda intereso mi legis la recenzon pri *La alia Ameriko* de Svetoslav Minkov, tradukis Georgi Hrŝev. Vekis mian atenton la diraĵo :

*La realismo de la rakonto estas tamen iom difektita per kelkaj ŝajne fikciaj anekdotoj kaj per tre kalumnia opinio pri la kvalitoj de la brazila civitano. Tio ŝancelas la fidemon de la leganto pri la efektivaj faktoj en la libro.*

Dankon, kara recenzisto, pro tiom sincera kritiko. Mi estas certa, ke ne nur mi, sed homoj ĉie en la mondo, opinias, ke estas nelaŭdinde kalumnii tiamaniere popolon, kies civitanajn kvalitojn, ĉu temas pri brazilanoj, ĉu pri alilandanoj, oni notis nur supraĵe. Estas bedaŭrinde, ke tion oni povis enigi en libron, sed des pli riproĉinde, ke oni tradukis tion Esperantlingve !

Mi rimarkis la komentojn pri la multaj provincaĵoj en la nomita traduko. Imagu se ĉiu tradukinto uzadus similajn vortojn ! Nova Babelo naskiĝus en la Lingvo Internacia ! Tio estus ridinda.

Mi sincere dankas *Esperanto* pro defendo de mia popolo.  
F. S. Almada

## KIO ESTAS VIA V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo (V.-K.) estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. **Frakaso** : (a) batego, (b) vespera vesto, (c) disrompo ?
2. **Amara** : (a) milda, (b) maldolĉa, (c) malakra ?
3. **Sterni** : (a) kuŝigi, (b) brue kaj spasme elspiri aeron per nazo kaj buŝo, (c) konsekri ?
4. **Menso** : (a) homo, (b) korpo, (c) intelekto ?
5. **Kulto** : (a) ceremoniaro, (b) prilaboro de tero, (c) parto de brako ?
6. **Albino** : (a) speco de birdo, (b) homo blankhara, (c) kapvesto ?
7. **Moto** : (a) polvo, (b) sentenco, (c) deziresprimo ?
8. **Frivola** : (a) libervola, (b) serioza, (c) malserioza ?
9. **Mesaĝo** : (a) kuraca frotado de muskoloj, (b) sciigo, (c) homo rigardata kiel savonto ?
10. **Roso** : (a) haŭtmalsano, (b) floro, (c) gutoj de vaporo, kiuj fluidiĝas dumnokte sur vegetaĵojn ?

La respondojn vidu sur p. 105



## TRA LA MONDO ESPERANTISTA

### Sukcesa kunveno en Bell Ville, Argentino

Dum Pasko okazis kunveno de enlandaj delegitoj de Argentino, kaj estas rimarkinde, ke ĉi tie por la unua fojo en tiu lando Esperanto ricevis oficialan apogon. La renkontiĝo okazis en la *Peña de Arte y Cultura* kaj la partoprenintojn akceptis la Urbestro, kiu poste mem kondukis ilin tra la urbodomo kaj metis luksan salonon je ilia dispono.

Post aferkunsido la direktoroj de la Instruista kaj Industria Lernejo akceptis la delegitojn kaj pluraj vizitoj al gravaj urbaj instancoj sekvis. Sabaton 8-an de aprilo la prezidanto de A.E.L.—S-ro E. Iglesias—faris publikan paroladon pri la problemo de L.I. en la salono de la urbdoma biblioteko. Fondiĝis poste Esperanto-Asocio *Bell Ville*.

### Granda intereso pri Esperanto flanke de Metodista eklezio en Aŭstralio

Sekve de iniciato en Ballarat, kie la Metodista eklezio starigis kurson de Esperanto sub patronado de la pastro S-ro McKenzie, montriĝas intereso en vastaj Metodistaj rondoj en Aŭstralio. Oni intencas starigi apartan religi-esperantan ekspozicion en Ballarat kaj poste rondirigi ĝin tra la Metodista eklezio. Taŭgan materialon sendu al S-ro McKenzie, Minister, Methodist Church, Albert St., Ballarat, Vict., Aŭstralio.

Kurso okazas en la tiuloka artlernejo kun multe da sukceso, kaj oni esperas ankaŭ tie starigi ekspozicion de arto en kuniĝo kun Esperanto.

FD de U.E.A. S-ro D. Brkiĉ en Ballarat multe klopodas por nia afero kaj sukcesis penetri en multajn novajn mediojn.

### Afera kongreso de britaj Esperantistoj en Nottingham

Dum la Pentekostaj tagoj la Kongreso kaj Jarkunveno de la Brita Esperantista Asocio okazis laŭplane en Nottingham. La organiza kaj financa aspektoj de la movado plejparte okupis la ĉeestantojn en la aferkunsidoj. La kunveno reelektis en la komitaton de U.E.A. samideanojn Kennedy kaj Oliver, kaj delegis E. D. Durrant anstataŭi S-ron B. E. Long, kiu ekzigis. Balo kaj ekskurso donis konvenan distron al la kongresanoj.

**Essex Education** estas pedagogia periodaĵo de la graflando Essex en sudorienta Anglujo. Estas interese legi tie gravan kaj objektivan artikolon pri la meritoj de Esperanto sur la tereno pedagogia verkita de lernejestro F. J. May de la Lymington Secondary Boys' School. Gratulojn.

### Klopodo ĉe Unitarianoj en Ĉeĥoslovakujo

La 12-an de aprilo s-ino Julie Šupichová prelegis en kunveno de la Unuiĝo de Unitarianaj Virinoj en Praha pri nia afero kaj ĝia signifo por la tutmonda paco.

### Starigo de nova organizaĵo en Hispanujo

S-ro Eusebio Maynar en Zaragoza sciigis nin pri grava paŝo por Esperantismo en Hispanujo. La registaro ĵus aprobis la starigon de *Katolika Esperantista Hispana Asocio* kun provizora centro en la nomita urbo. La celoj estas konigi la katolikan doktrinon inter Esperantistoj kaj disvastigi Esperanton inter hispanaj katolikoj. S-ro Mayner estas nomita sekretario de la asocio. Informojn ĉe li ĉe : Manifestación 35, 2, Zaragoza, Hispanujo.

### Festotagoj en Italujo

En Como sur la lagobordo okazis 20 majo parolado de Prof. Canuto kaj en la sekvanta tago gaja ekskurso sur la lago.

La grupo en Varazze en la sama tago okazigis gravan ceremonion, t.e. inaŭguro de Esperanto-flago kaj disdonado de lingvo-premioj. Ĉeestis kaj favore parolis la urbestro, kaj FD. de U.E.A. S-ino C. Conterno-Guglielminetti faris oficialan paroladon. Post la ceremonio la partoprenantoj amase iris al la nova Esperanto-domo por inaŭguri ankaŭ ĝin per . . . bonega komuna tagmanĝo !

Tiu ĉi domo, verŝajne la unua en Italujo, estas unu el la plej belaj pensionoj de tiu ĉarma marbordo kaj Esperantistoj povos ĝui specialajn prezojn.

### La malproksima oriento kongresas

Je 22-23 julio okazos en Yokohama, Japanujo, la 37-a Tutjapana Esperanto-Kongreso. La kongreso okazos en la Teknologia Fakultato de la Nacia Universitato de Yokohama. Ni esperas doni raporton en estonta numero.

### Bonaj perspektivoj en Jugoslavujo

La ĉefa jarkunveno de Kroatia Esperanto-Ligo je 16 aprilo 1950 detale analizis la atingojn de la laborjaro 1949. Malgraŭ ĉiuj malhelpoj la rezulto tamen estis multe pli bona, ol oni planis. Bona instrumentado produktis bonajn kaj flue parolantajn novulojn. Finance la organizaĵo estas stabila. En la pasinta somero la Ligo organizis sukcesan somerrestadon sur insulo Zlarin apud Ŝibenik. Kun financa helpo de U.E.A. nova eldono de Kroata Ŝlosilo estis farata.

La signoj estas, ke en la nova laborjaro K.E.L. atingos eĉ pli grandajn sukcesojn.

Eks

Arhem  
aranĝi g  
kiu mon  
alvokas  
letero re  
sin turn  
Nederlar

Esper  
Nederlar  
inaŭguro  
matene l  
estis me  
monume  
pioniro  
fondinto  
soldatoj  
moment  
liberigis  
detruita  
pretigint  
devis pl

En la  
filo kaj f  
de sur la  
de la N  
faris pa  
impreso  
umestro  
monumu  
trans la  
Poste pa  
de L.E  
mortint  
poeman

Norve

Dum  
okazigis  
ataj esti  
kaj klub  
gasto ĉe  
dum la  
N.E.L.

Sabat  
de la di  
vespero  
kunven  
C. Stop  
bonan  
dissend  
al ĉiuj  
registri  
gazetoj  
Ĉefp  
la pro



**Ekspozicia komitato en Arnhem uzas Esperanton**

Arhema Kunlaborkomitato, kies tasko estas aranĝi grandiozan ekspozicion *Mejloŝtono* 1950, kiu montros ĉiujn fazojn de la Arnhema vivo, alvokas la internacian publikon per cirkulera letero redaktita en Esperanto. Por informoj oni sin turnu al: Jansbinnensingel 20, Arnhem, Nederlando.

**Esperanto-monumento sur Teksel** (Texel), Nederlando: Je la 29-a de majo okazis solena inaŭguro sur insulo Texel. Gesamideanoj kunvenis matene kaj je la dekdua okazis kunveno dum kiu estis montrata filmo pri la konstruado de la monumento en 1935. En la filmo vidiĝis la pioniro de Esperanto, S-ro Joh. M. Duinker, la fondinto de la monumento. Lin murdis okupintaj soldatoj je la 6-a de aprilo 1945 preskaŭ en la momento, kiam la britaj kaj usonaj soldatoj liberigis Nederlandon. La monumento mem estis detruita dum la milito. S-ro Duinker jam estis pretiginta planojn por la rekonstruo, sed la taskon devis plenumi aliaj.

En la soleno pri la rekonstruita monumento, la filo kaj filineto de la mortinto deprenis la kovraĵon de sur la memortabulo al sia patro. Reprezentanto de la Nederlanda Registaro, S-ro Rooswinkel, faris paroladon profundsentan, kiu faris gravan impreson ĉe multinombra publiko. La komunumestro de Teksel ĝojis pri la restarigo de monumento, kiu memorigas la ekziston de ponto trans la ondojn de miskompreno inter la popoloj. Poste parolis S-ro Andreo Cseh kaj reprezentantoj de L.E.E.N. kaj F.L.E. Ĉe la tombo de la mortinto, S-ro Tiessen elparolis poemon el la poemaro de la rezistmovado.

**Norvegaj gesamideanoj kunvenas en Bergen**

Dum la Pentekosto Norvega Esperantista Ligo okazigis sian jarkunvenon en Bergen. Reprezentataj estis la plej multaj okcident-norvegaj kluboj, kaj kluboj en Oslo, Hamar kaj Trondheim. Kiel gasto ĉeestis s-ino M. Haudebine el Parizo, kiu dum la lasta laborsezono gvidis kursojn por N.E.L. en okcidenta Norvegujo.

Sabaton posttagmeze okazis la ĝenerala kunveno de la distriktorganizaĵo kaj vespere interkonatiĝa vespero. Dimanĉon kaj lundon okupis la ĝenerala kunveno de N.E.L. sub prezido de muzea kuratoro C. Støp-Bowitz. Jarraporto kaj jarbilanco montris bonan progreson. La gazetara servo dum 1949 dissendis ĉiun duan semajnon Esperantonovaĵojn al ĉiuj norvegaj taggazetoj (proks. 200) kaj registris 741 artikol(et)ojn pri Esperanto en 137 gazetoj.

Ĉefpunkto de la programo estis prelego de la propagandestro s-ro Johan Matland: *Kiel*

*disvastigi Esperanton en nia lando?* kun posta diskuto. Oni diskutis propagandon ĉe maristoj, kaj oni decidis klopodi akiri almenaŭ 3 eksterlandajn instruistojn por la venonta sezono. Elekto de oficistoj rezultigis retenon de C. Støp-Bowitz kiel Prezidanto kaj Olav Rygg anstataŭis H. A. Rosback kiel ĝen. sekretario.

Dimanĉon vespere okazis bela festo kaj lundon aŭtobusa ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Bergen.

**ESPERANTISTA VIVO**

**Geedziĝoj**

**Attenborough-Pacey.** Je la 12-a de Majo 1950 Maurice Attenborough kun Marjorie Pacey.

**Rosbach-Røise.** La 5-an de julio 1950 Johan H. Rosbach, prez. de Klubo Esp-ista en Oslo kaj ĉefredaktoro de *Norvega Esperantisto* kun Dagny Røise, membro de la Klubo.

Al niaj gesamideanoj ni direktas niajn sincerajn bondezirojn.

**Niaj Mortintoj**

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

**Brakel,** S-ro R. C., 14 marto 1950, 61-jara. Estinta prezidanto de la grupo en Kolonjo kaj de la Rejnlanda Vestfalia Ligo. Sindona samideano.

**Kremer,** S-ino A. en Košice, Slovakujo, 3 aprilo, 1950, 70-jara. Edzino de samideano Alojz D. Kremer.

**Moffat,** S-ro J. Valpy, 19 majo 1950, 59-jara, en Wallington, Anglujo. FD de U.E.A.

**Rehse,** S-ro August, 2 marto, 1950, 80-jara en Hannover, Germ. Ĉe la enteriga ceremonio Otto Fuchs, konata operkantisto kaj samideano, kantis en Esperanto.

**Rossetti,** S-ro Cesare, 8 majo 1950, 48-jara, en Nottingham, Anglujo. Frato de Reto Rossetti kaj mem konata kiel verkisto.

**Ruttmann,** S-ro Ernst, en Stuttgart. Malnova samideano kaj kuzo de S-ino Prieur (estinta F-ino Amélie Ring) iama oficistino de la Centra Oficejo de U.E.A.

**KIO ESTAS VIA V.-K. ? (vidu p. 103)**

**Respondoj**

1. (c) **Frakaso** estas perforta kaj brua disrompo.
2. (b) **Amara** estas maldolĉa por la gusto. Figure uzata: *amaraj sentoj*.
3. (a) **Sterni** signifas kuŝigi.
4. (c) **Menso** estas intelekto aŭ spirito, kontraste kun la korpo.
5. (a) **Kulto** estas religia ceremoniaro. Ankaŭ figure uzata.
6. (b) **Albino** estas homo, kies haroj estas blanke senkoloraj, kaj kies okuloj ofte estas ruĝetaj.
7. (b) **Moto** estas sentenco, aŭ mallonga frazo pruntita el verko de iu aŭtoro kaj lokita antaŭ libron aŭ artikolon por montri ĝian ĉefan ideon.
8. (c) **Frivola** estas malserioza.
9. (b) **Mesaĝo** estas sciigo aŭ komuniko (ne en P.V.)
10. (c) **Roso** la malsekajo sur vegetaĵoj en frua mateno.



**EGIPTA SAMIDEANO EN SKANDINAVIO**

Post la 34-a U.K. en Bournemouth, S-ro Tadros Megalli el Cairo, Egiptujo akceptis inviton de la Sveda Esperanto-Federacio fari prelegojn en Svedlando dum la vintro. Tiu prelegserio komenciĝis en septembro 1949 kaj finiĝis en decembro. En tiu tempo S-ro Tadros Megalli faris entute 150 prelegojn kun temo: *Egiptujo, lando de la piramidoj kaj faraonoj.*

En decembro la preleganto iris, invitite de la Dana Komun-Komitato, al Kopenhago kaj restis en Danlando dum 5 semajnoj. En tiu tempo li faris 60 prelegojn en 30 urboj antaŭ proks. 7000 personoj.



En februaro S-ro Tadros Megalli reiris en Svedlandon kaj komencis novan serion de prelegoj. Ĝis majo li faris ankoraŭ 60 prelegojn, kio necesiĝis, ke li ofte veturu al nova loko ĉiutage. Oni taksas la sumon de aŭskultantoj je proksimume 20.000. Aldono al la prelego ofte estis kelkminuta provleciono kaj posta prezento de araba muziko per gramafondiskoj.

Estas ĝojige raportiti, ke en la tempo, kiam nia egipta samideano estis en Svedlando, oni vendis al la publiko 2.000 lernolibrojn kaj 5.000 ŝlosilojn!

S-ro Tadros Megalli per ĉi tiu raporto volas esprimi sian koran dankon al Sveda Esperanto-Federacio kaj precipe al ĝia energia prezidanto S-ro J. Strönne kaj la sekretario S-ro Helmer Almen. Al la prezidanto de U.E.A., S-ro Malmgren, li direktas apartan dankon. En Danlando S-ro Kuhlmann, prezidanto de la Kopenhaga Klubo, streĉe laboris por sukcesigi la entreprenon.

Post la U.K. en Parizo S-ro Tadros Megalli esperas fari novajn prelegvojaĝojn en aliaj landoj, laŭ invito.

**INTERNACIA KONKURSO 1950**

La tabelo, kiu sekvas, indikas la staton je la fino de majo. Plej interesa estas la fakto, ke 11 landoj jam atingis sian kvoton kaj ĉio ŝajne indikas tre bonan rezulton en la fino de la jaro.

Maroko ankoraŭ tenas la unuan lokon sed Hispanujo bone progresis kaj kelkaj landoj estas sufiĉe proksimaj por ebligi surprizan ŝanĝon je la situacio.

Ĉu vi faris vian kontribuon per varbado de viaj amikoj por tiel helpi al via lando okupi indan pozicion? Precipe se vi estas Delegito memoru, ke en la plej sukcesa lando ĉiu Delegito ricevos libro-premion. Do varbu kaj varbu konstante!

	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	250	405	162.0
2. Hispanujo ..	600	955	159.2
3. Izraelo ..	250	280	112.0
4. Germanujo ..	2000	2140	107.0
5. Urugvajo ..	250	260	104.0
6. Finnlando ..	1800	1870	103.9
7. Aŭstralio ..	900	930	103.3
8. Svislando ..	1300	1330	102.3
9. Svedlando ..	4900	4995	101.9
10. Belgujo ..	2000	2001	100.0
Sud-Afriko ..	250	250	100.0
11. Aŭstrujo ..	700	695	99.3
12. Nederlando ..	5100	4931	96.6
13. Italujo ..	1450	1360	93.1
14. Francujo ..	5200	4604	88.5
15. Danlando ..	3100	2735	88.2
16. Britujo ..	12500	10962	87.7
17. Brazilo ..	2200	1841	83.7
18. Nov-Zelando ..	850	691	81.3
19. Usono ..	3100	2327	75.1
20. Irlando ..	250	185	74.0
21. Kanado ..	250	180	72.0
22. Hungarujo ..	1400	915	65.4
23. Islando ..	680	385	56.5
24. Norvegujo ..	1500	860	57.3
25. Argentino ..	1000	530	53.0
26. Pollando ..	4650	1845	39.7
27. Egiptujo ..	250	75	30.0

**Eldiraĵoj de Fontenelle**

(1657-1757)

Ekzistas tri aferoj, kiujn mi, tre amis, kaj pri kiuj mi tamen nenion komprenis: la muziko, la skulptarto kaj la virinoj!

\* \* \*

Riĉa financisto diris al Fontenelle:

“Necesas granda animforteco por malestimigi la riĉaĵon”. “Tute ne” respondis Fontenelle, “oni devas nur pensi je tio, en kiuj manoj la riĉaĵo ĝenerale troviĝas.”

\* \* \*

Amiko laŭdis la klarecon de la penso kaj de la esprimo en la skribaĵoj de Fontenelle. “Jes ja”, tiu respondis, “estas vere, ke mi faris mian eblon por min kompreni.”

**Pro nebonsano S-ro Hans Jakob ne povos atenti korespondaĵojn dum proks. unu monato.**

Mall  
Ĉiutage  
Diman  
Lundo  
Mardo  
Merkre  
Ĵaŭdo  
Vendre  
Klar  
la hor  
aldon  
Ĉiu  
29 B  
Gra  
Roma  
Bonv  
Kato  
al aŭ  
dema  
At  
je la  
17.00  
infor  
estas  
grat  
Rad



**ESPERANTO KAJ RADIO**

*Mallongigoj* : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĝintage</b>	15.00-15.15	Praha. 25.34m., 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.30	Praha. 25.34m. I.
<b>Dimanĉo</b>	16.00-16.20	Roma. 19m. kaj 25m. I. Radiodiffusioni Per L'Estero— Esperanto—Via Veneto 56, Roma, Italujo.
	05.30-05.35 16.30-17.00	Wien. 513m., 31m., 41m. I. Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
<b>Mardo</b>	21.50-22.00	Praha. 470m. P.
	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.49m. P. D-ro Baur. SRG, Kurz- wellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
<b>Merkredo</b>	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.50-22.00 22.00-23.00	Praha kiel lunde Praha II. 470m., 314m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
<b>Vendredo</b>	08.05-08.20	Paris. 347m., 48.39. K.
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusetalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 203m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	16.00-16.20	Roma. Kiel dimanĉe.

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Grava atentigo** : Ni konsilas sendon de leteroj al Radio Roma, pro la restarigo de regulaj elsendoj en Esperanto. Bonvolu atenti la informojn pri la XXII Int. Kongreso de Katolikaj Esp-istoj en Romo (10-17 aŭg.) kaj la respondojn al aŭskultantoj, kiuj estas invitataj sin anonci per interesaj demandoj.

**Atentu!** Radio-Lille kiel provon, dissendis en Esperanto je la jenaj datoj : 24 majo ; 7/12 junio ; 5 julio. Horo 17.00-17.15, ondolongo 235m. Parolado. Ni ne estis informitaj sufiĉe frue por publikigi tiun informon, sed estas nepre necese, ke samideanoj skribu al la stacio por gratuli. De tio dependas pluaj elsendoj. Skribu al : Radiodiffusion Française, LILLE (Nord), Francujo.

**ENIGMA KONKURSO N-ro 50**

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 46-a konkurso : S-roj G. Turin (Franc.) 130, F. O. Bevan (Angl.) 126, G. Englert (Germ.) 124 poentoj. Sekvas post ili : S-ro F. Couwenberg 122, F-ino A. C. Nilssen 122, S-ino N. Koudijs-Modoo 121, F-ino N. Hanson 121, S-ro A. E. Rosengaard-Hansen 120, S-ro B. S. Trier 113, S-ro V. Marcone 110, S-ro F. Jelenc 102, S-ro Th. Sund 101, S-ro A. Csader 101, S-ino C. M. E. den Hollander-Mighorst 96, S-ro T. K. Slade 95, S-ro R. Launay 93, S-ro M. Rétot 92, S-ro C. Graversen 89, S-ro A. v.d. Velde 87, F-ino B. Bowell 87, S-ro G. Faraco 84, S-ro M. Cornet 83, F-ino J. Dedieu 79, S-ro P. Kustaanheimo 78, S-ro L. Vitali 76, S-ro W. Rusch 73, S-ro H. Evers 71, S-ro A. H. v.d. Broek 70, S-ro H. Steinberg 69, S-ro F. Kreutzberg 68, S-ro P. Brunet 67, S-ro H. Westergaard 65, S-ro E. Schmitt 61, S-ro W. P. Roelofs 61, S-ro A. de Vries 60, S-ro J. Hanus 52, S-ro G. Larglantier 50, S-ro A. Stanura 48, S-ro D. I. Oreb 47, S-ro D. A. W. Henskes 45, S-ro N. G. Wright 45, S-ro S. Roelofsen 45, S-ro Ch. F. W. Slijper 43, S-ro B. S. Ohana 43, S-ro A. Jensen 42, S-ro S. Roca Rodó 40, S-ro A. V. R. King 40, S-ro A. C. Coutinho 40, kaj ankoraŭ multaj kun malpli da poentoj.

Per tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias tion, ni ripetas, ke ĉiu M.A. de U.E.A. kun la sama ŝanco povas komenci la ensendon de la solvoj je kiu ajn momento. Por ĉiu tute korekta solvo mi kutime donas 5 poentojn, por havi la eblecon rekompenci ankaŭ ne tute korektajn solvojn per malpli da poentoj. Tiuj poentoj estas enskribataj en liston, kaj ies poentnombro kreskas, se ŝi aŭ li daŭrigas la ensendon. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion, kaj ilia poentnombro estas nuligata. Se ili daŭrigas la ensendon ili rekompencas kun 0 poentoj. Tiel 63 personoj jam gajnis premio(j)n, inter kiuj 14 gajnis dufoje, 8 trifoje, kaj 10 kvarfoje. Tiu sistemo garantias, ke ĉiu partoprenanto, kiu daŭrigas la ensendon, iam gajnos premion, ĉar la asigno ne dependas de lotumado. Entute mi ricevis solvojn de 225 personoj en 32 landoj. La premioj konsistas el libroj, kiujn la gajnintoj mem rajtas elekti ĝis la sama valoro por ĉiu. Ĉar la solvoj aperas du monatojn post la enigmoj, la limdato por Eŭropanoj estas du monatoj. Ekster Eŭropo oni havas iom pli da tempo. Se por iuj solvantoj la afranko estas tro alta, ili povas ensendi la solvojn de du konkursoj samtempe, kondiĉe ke la solvoj estu forsendataj antaŭ ol la dumonata periodo por la unuaj solvoj finiĝis. Tiu, kiu deziras pliajn informojn, aldonu respondkuponon.

**Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 48 :**

**N-ro 104** : Pli bona io ol nenio.

**N-ro 105** : Lerta mano ne restas sen pano. Antaŭmetitaj literoj : al, be, ar, st, ba, am, da, an, bo, an, ce, er, se, as, at, da, es, os, ĉe, an, ap, ĉa, an, ko.

**N-ro 106** : En la mondon vena(i)s nova sento. Ŝlosilvortoj : elasta, nebulo, libera, angulo, masoni, orbito, novico, degeli, ofendi, nuanco, vegeti, embrio, nivelo, agonii, skurgi, nombro, okulta, veneni, apogeo, stacio, enigmo, natura, titana, ordono.

En la septembra numero ne aperos enigmoj.

**14. Arsberetning** fra J. E. Ohlsens Enkes Plantepatologiske Laboratorium. Ĉiujara raporto de la Fitopatologia Laboratorio de J. E. Ohlsens Enke, Kopenhago. De Paul Neergaard. Angla resumo kun resumo en Esperanto.



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo  
OFICIALA INFORMILO

6-an de Junio 1950

N-ro 228.

**DELEGITOJ**

**Aŭstrujo**

**Steyr.** VD : S. Szabo, Wernidlgasse 12. Tel : 1016.  
FD (Komerco) : La VD.  
**Waidhofen.** D : F-ino P. Pirchan, Hauptplatz 12.

**Danujo**

**Thisted.** D : J. Talskov, Vegendalgaard 12 B. Tel : 1188.

**Francujo**

**Tourcoing.** VD : G. R. Gousseau, 77 Rue Cuvier.

**Germanujo**

**Hannover.** FD (Teatro) : O. Fuchs, Blumenhagenstr. 7 A. Tel : 20325.  
**Mosbach** (Hessen). D : Pastro E. Kuhn, Mosbach über Babenhausen.

**Islando**

**Ĉefdelegito** : Magnus Jónsson, Tysgata 1.

**Jugoslavujo**

**Koprivnica.** D : A. Nemeč, Starogradska 4.

**Nederlando**

**Schiedam.** FD (Korpa edukado) : S. van Gils, Jan Steenstraat 35.

**Svedlando**

**Lindesberg.** D : S. Söderland, Kristinavägen 30. Tel : 15 & 227.  
**Sundsvall.** FD (Instruado) : F-ino A. Dahlgren, Nybrogatan 54 C. Tel : 55371.

**SANĜOJ**

**Argentino**

**Perez Millan.** D : vakas.

**Aŭstralio**

**Hazelbrook.** D : vakas.

**Belujo**

**Huy.** D : nova adreso : 42 Rue Sous le Chateau.

**Britujo**

**Wallington.** FD (Filozofio) : vakas.

**Danlando**

**Fakse Ladeplads.** D : nova adreso : "Birke".  
FD (Lingvoj) : vakas.  
FD (Ornitologio) : La D.  
**Nysted.** VD : nova adreso : Skovstrade.

**Francujo**

**Angers.** FD (Turismo) : nova adreso : 13 rue des Lices.  
**Marseille.** D : nova adreso : 106 Avenue Joseph Vidal.  
**Roussillon.** D : vakas.

**Germanujo**

**Konstanz.** D : nova adreso : Brühlstr. 21.

**Hispanujo**

**Puigcerda-V.** D : vakas.

**Islando**

**Reykjavik.** FD (Turismo) : nova adreso : Tysgata 1.

**Italujo**

**Roma.** FD (Turismo) : vakas.  
**Tortona.** D : nova adreso : via Campanella 51.

**Kanado**

**Picton.** D : vakas.  
**Victoria.** D : nova adreso : St. Mary's Priory, 606 Douglas St.

**Nederlando**

**Adorp.** D : vakas.  
**Leiden.** FD (Ĉe-metoda instruado) : vakas.

**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

Fredriksson, S-ro H., Vardsberg, Svedlando.  
Ahlqvist, S-ro A., Skanes Varsjö, Svedlando.  
Maynar, S-ro E., Zaragoza, Hispanujo.

**PATRONOJ 1950**

15. Churchill, S-ro L. A., Derby, Anglujo.

**MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950**

258. Treude, D-ro W., München, Germanujo.  
259. Redhead, S-ro R., Victoria, B.C., Kanado.  
260. Witulska, S-ino F., Warszawa, Pollando.  
261. Mamrot, S-ro K., Warszawa, Pollando.  
262. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belujo.  
263. Tell, S-ro L., Stora Essingen, Svedlando.  
264. Haxton, S-ro J. T., St. Andrews, Skotlando.  
265. Lewis, S-ro P. H., Didcot, Anglujo.  
266. Morris, S-ro W., Birmingham, Anglujo.  
267. Shaw, S-ro J. H., Swanwick, Anglujo.  
268. de Ville Mather, S-ino A., Todmorden, Anglujo.  
269. Lippmann, S-ino E. C., Brooklyn, Usono.  
270. Smart, S-ro H. W., Brooklyn, Usono.  
271. Alevedra, S-ro V., Tarrasa, Hispanujo.

**DONACOJ.** M. Sygnarski 7s. 6p., M. Fréchet £2, L. J. Byars 3s. 6p., A. D. Newman 4s., D-ro F. J. Williams £20.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de Majo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Majo 1949 :

	1949	1950
Asociaj membroj ..	6199	5977
Individuaj membroj :		
MJ .. ..	667	708
MA .. ..	3820	3880
MS .. ..	335	272
Patronoj ..	15	15
DM .. ..	180	203
HM .. ..	57	56
	5074	5134
	11273	11111

CECIL C. GOLDSMITH, Sekretario

**LA VENONTA NUMERO APEROS EN SEPTEMBRO.  
NE SKRIBU AL LA C.O. DUM LA KONGRESA  
PERIODO. DANKON.**



## **NE NUR POR HISPANA ESPERANTISTO**

sed ankaŭ por ĉiu eksterlanda samideano estas nepre leginda kaj tre interesa la

### **Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio**

Petu senpagan provekzempleron kaj tarifon kun tre favoraj abonkondiĉoj ĉe

**Hispana Esperanto-Federacio,**  
str. Ruzafa 7, Valencia, Hispanujo

## **Preĝlibro por Spiritistoj**

de

**Allan Kardec**

El la franca lingvo tradukis I.G.B.

Bele bindita 1sil. aŭ 4 rpk.

Broŝurita 6p. aŭ 2 rpk.

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## **NONI KAJ MANI**

de **Jon Svensson**

Tradukis Paul van den Hövel

Rakonto pri la spertoj de du malgrandaj Islandaj knaboj, kiuj perdis sur la vasta maro

Bele presita sur bonega papero  
160 paĝoj

Broŝ. 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## **Diabet' en la Botel'**

de

**Robert Louis Stevenson**

Elangligis

**Jozefo Seka**

48 paĝoj : 1ŝ. 10p. aŭ 7 rpk., afrankite

Eldonita en Germanujo

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## **LITERATURO DE LA REVOLUCIO**

Verkoj spirantaj la aspirojn de la bulgara popolo dum ĝia lukto por la libero. Inspira prozo, reprezentaj bildoj el la vivo de la kamparanoj, patoso, humoro, tragedio.

<b>Avo Joco Rigardas</b> (Vazov) .. .. .	8p.
<b>Elektitaj Rakontoj</b> (Elin Pelin) .. .. .	2ŝil. 3p.
<b>Legolibro por superaj kursoj kaj memklerigo</b> (Sarafov) ..	6ŝil. 6p.
<b>Novaj Bulgaraj Rakontoj</b> (Vazov) .. .. .	1ŝil. 6p.
<b>Vagabondoj</b> (Vazov) .. .. .	5ŝil.
<b>La Alia Ameriko</b> (Minkov)—vojaĝo trans la oceanon ..	3ŝil.

afranko inkluzivita

Aĉetante ĉi tiujn librojn oni helpas al samideanoj en Bulgarujo aniĝi al la tutmonda organizaĵo Esperantista.

Haveblaj ĉe :

**LIBROSERVO DE U.E.A.**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

kaj ĉe ĝiaj perantoj en pagokapablaj landoj